ISSN 2072-5825

# Espero Katolika



Numero 4-6/2018

Aprilo-Junio 2018

**_Sur la kovrilo:_** La papo Francisko akceptis ortodoksan metropoliton Rastislav

## ENHAVO


| | |
|---|---|
| LA PAPO FRANCISKO: APOSTOLADO DE CIRILO KAJ METODIO RESTAS MODELO DE EVANGELIZADO | 19 |
| LA DIA PLANO POR LA KUNULECO KUN LA HOMOJ | 21 |
| NI FIDU AL DIA MIZERIKORDO | 22 |
| LA FORGESITA ENCIKLIKO | 23 |
| PRI LA AKTUALA KAJ MONDVASTA T.N. GENRISMA IDEOLOGIO | 24 |
| LASTA LUKTO OKAZOS PRO GEEDZECO KAJ FAMILIO, KONFIDIS SIN AL KARDINALO LA VIZIULINO EL FATIMO | 28 |
| PREĜO AL LA ĈEFANĜELO MIĤAELO | 28 |
| FRANCAJ EPISKOPOJ PRI EŬTANAZIO | 29 |
| LA MURO DE LAMENTADOJ | 29 |
| PRINCO DE LA ĈIELAJ LEGIAROJ | 30 |
| PSIĤOANALIZO KRISTANA | 31 |
| FORLASIS NIN KAREGA SACERDOTO LAJOS KÓBOR | 32 |



**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>

**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org *** Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>

**UEA-konto "ikue-v" * Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio

tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano:** Pavol Petrík. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli,Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# LA PAPO FRANCISKO: APOSTOLADO DE CIRILO KAJ METODIO RESTAS MODELO DE EVANGELIZADO

**La papo Francisko akceptis ortodoksan metropoliton Rastislav, la ĉefulon de la Ortodoksa eklezio en Bohemio kaj Moravio (Ĉeĥio), 09.05.2018**

„Inter la spiritaj ligiloj, kiuj kunigas nin, mi volas memorigi la tombon de la sankta Cirilo en antikva baziliko de la sankta Klimento en Romo, la apostolo de slavoj, kies heroldado disvastigis kredon en landoj, kie via eklezio realigas sian mision“ – diris la papo dum la maja aŭdienco de la ortodoksa metropolito Rastislav. Tiu ĉi kvardekjaraĝa ĉefepiskopo de Prešov (Slovakio) estas ĉefo de la ortodoksa eklezio en ĉeĥaj landoj kaj en Slovakio, kiu estas la plej juna el la aŭtokefaliaj ortodoksaj eklezioj. Malgraŭ tio, ke ĝi en ambaŭ landoj havas iom pli ol 70 milojn da membroj, ĝia graveco nuntempe kreskas precipe danke al enmigrintoj el Ukrainio.

### Komuna heredaĵo de la sankteco

Ĝuste la persono de la sankta Cirilo, honorata kaj en Oriento kaj en Okcidento, inspiris la posteulon de Petro al tri pripensoj, pri kiuj li volis – kiel li diris – „fratece sin dividi“. La tesalonikaj fratoj alportis al la papo Hadriano la Dua relikvojn de la sankta Klimento, de unu el la unuaj episkopoj de Romo, kiu mortis en ekzilo dum regado de la imperiestro Trajano, memorigis la papo kaj aldirante:

*„Tiu ĉi gesto de Cirilo kaj Metodio al ni memorigas, ke ni, la kristanoj, komune heredis treegan komunan heredaĵon de la sankteco, en kiu ni devas senĉese partoprenadi. Inter multaj atestantoj la sennombraj martiroj – simile kiel la sankta Klimento – konfesis fidelecon al Jesuo ne nur dum la pasintaj jarcentoj, sed ankaŭ antaŭ nelonga tempo, ekzemple kiam la ateisma persekutado trafis viajn landojn. Same tiel ankaŭ nuntempe la suferado de multaj gefratoj persekutataj pro la evangelio estas la urĝa alvoko, kiu nin instigas al serĉado de pli granda unueco. La modelo de la sanktaj Cirilo kaj Metodio helpu nin plene aprezi ĉi tiun heredaĵon de la sankteco, kiu nin jam kunigas.“*

### Rilato de la evengelizado kaj kulturo

Kiel la dua vidpunkto, pri kiu nin atentigas personoj de la slavaj Kredheroldantoj, menciis la papo rilaton inter la evangelizado kaj kulturo.



*„Kiel kleraj Bizancanoj tiuj ĉi fratoj decidis traduki la evangelian mesaĝon en la lingvon uzatan de la slavaj nacioj de la Granda Moravio. Per tio, ke ili engreftis la evangelion en la konkretan kulturon, ili per tio helpis ĝian disvastigon. La apostolado de la sanktaj Cirilo kaj Metodio, kiujn la papo Johano Paŭlo la Dua proklamis kunpatronoj de Eŭropo, restas por ni ĉiuj ankaŭ hodiaŭ modelo de la evangelizado. Dum predikado de la Sinjoro ne sufiĉas fortigi nur skemojn de la pasinteco, sed estas necese ekaŭskulti la Spiriton, kiu senĉese sugestas novajn kaj kuraĝajn vojojn al la evangelizado de la nuntempaj homoj. Li faras tion ankaŭ hodiaŭ, eĉ en la tradicie kristanaj landoj, kiuj ofte estas markitaj per sekularigo kaj indiferenteco.“*

**Sanktaj Cirilo kaj Metodio, antaŭirintoj de ekumenismo**

La tria punkto, al kiu la papo Francisko konekse al la tesalonikaj fratoj atentigis, estas la ekumena dimensio. Ili sukcesis venki konfliktojn inter kristanaj komunumoj de diversaj kulturoj kaj tradicioj, tiel ni povas ilin opinii kiel „veraj antaŭirintoj de ekumenismo,“ kiel ilin nomis la papo Johano Paŭlo la Dua (Slavorum Apostoli, 14).

*„Ili memorigas al ni, ke la unueco ne signifas unuformecon, sed kunordigon de diversecoj en la Sankta Spirito. Ke nin la atestadoj de la sanktaj Cirilo kaj Metodio akompanas dum irado al la plena unueco kaj instigas nin travivadi tiun ĉi diversecon en komuneco tiel, ke ni neniam lasu nin delogi de la vojo, kiun ni el la volo de la Sinjoro estas vokataj kun la ĝojo iradi.“*

La papo Francisko ankaŭ aprezis aktivan partoprenon de la ortodoksa eklezio en ĉeĥaj landoj kaj Slovakio en la komuna internacia komisiono por teologia dialogo inter la katolika kaj ortodoksa eklezioj, en kiu kunsidas – en la aŭdienco ankaŭ ĉeestanta – la ĉefepiskopo Juraj de Michalovce kaj Košice. Li esprimis ankaŭ deziron, por ke tiu ĉi komisiono, kiu en la jaro 2016 eldonis dokumenton pri la rilatoj inter la papa primeco kaj koncilieco en la unua jarmilo, daŭrigu en pliprofundigo de dialogo tiuteme.

Al la danko por la vizito plifirmiganta spiritajn kaj amikecajn ligojn la papo Francisko fine de la aŭdienco aldonis preĝon: „Je propeto de la sanktaj Cirilo kaj Metodio ni petu la Sinjoron, ke ni iun tagon atingu plenan unuecon, al kiu ni celas.“

**La ortodoksa metropolito Rastislav: Ni estas pilgrimantoj al Emaŭzo**



La metropolito Rastislav sin en sia alparolo al la Sankta Patro signis kiel unu el la posteuloj de la sankta Metodio sur la seĝo de la moravia-panoniaj ĉefepiskopoj dankante al Francisko, ke li akceptis lin „kun la sama ĝojo kaj amo, kun kiu la sanktan Metodion akceptis en la jaro 868“ lia honorinda antaŭulo Hadriano. Li ankaŭ memorigis, ke la jurisdikcio de lia eklezio koncernas ĝuste la teritorion, kien antaŭ 1155 jaroj venis la tesalonikaj fratoj invititaj fare de la princo Rastislav. La pilgrimon de la katolika kaj ortodoksa eklezioj li komparis al la iro al Emaŭzo:

*„Via Santeco, pro historiaj kaŭzoj nuntempe ne povas ni, la ortodoksoj kaj romkatolikoj, kune rompi la Panon de la Vivo. Tamen ni restas disĉiploj, kiuj kune kiel pilgrimuloj iras la vojon kaj kun kiuj, kvankam ni tion ne ĉiam konsciiĝas, kuniras ankaŭ nia Sinjoro kaj Dio, kiu konsolas nin, malfermas al ni skribojn, donas al ni novan esperon, plenigas nin per kuraĝo kaj renovigas nian konfidon. Brulas niaj koroj, kiam ni apude kune paŝas tra la historio. Ĝuste tiun ĉi sperton de la komuneco de la disĉiploj,*

*kiuj kiel pilgrimuloj kune iras laŭ la padoj de la historio, ambaŭ niaj ekleziaj komunumoj nomas tradicio. Tiu ĉi esprimaĵo estas kiel por la ortodoksoj tiel por la katolikoj pleni-gita per la multvalora esprimo,“* diris en sia alparolo la metropolito Rastislav.

Ni renkontiĝas kiel du disĉiploj, diris la ortodoksa ĉefepiskopo de Prešov, kiel pilgrimuloj tra maltrankvila mondo, kie la nenombrebla multo de la homoj perdas siajn radikojn, esperon kaj kredon, kie estas ĉiutage nia Sinjoro rifuzata, humiligata kaj denove krucumata en multaj homaj koroj, kie Li denove suferas pere de korpa, anima kaj spirita suferoj de niaj proksimuloj. En tiun mondon signitan per doloro kaj senespero ni estas kiel disĉiploj vokataj heroldi la ĝojan mesaĝon, la vivigantan kaj ĉion renovigantan vorton, la propran speron kun Resurektinto „transdonadi tiun ĉi sanktan tradicion al la mondo, tra kiu ni iradas,“ aldiris la metropolito Rastislav, la plej alta reprezentanto de la ortodoksa eklezio en ĉeĥaj landoj kaj Slovakio.

Fine de la renkontiĝo li donacis al la papo Francisko ikonon de la sanktaj Cirilo kaj Metodio kun grandmoravia princo Rastislav. ■

*Johana Bronková - Vatikano,11.5.2018*

**Leginte pri forpaso de la kardinalo Miloslav Vlk (18.3.2017), nia leganto Carlo Geloso havigis al ni la transskribon de lia esperantlingva prediko, kiun patro kardinalo faris en la preĝejo de sankta Maria la Neĝa, Olomouc (Ĉeĥa Respubliko) la 10-an de julio 1995, kadre de la 48-a IKUE-Kongreso. Ni volonte proponas ĝin, por denove memorigi tiom gravan kaj patrecan paŝtiston.**

## LA DIA PLANO POR LA KUNULECO KUN LA HOMOJ



Karaj gefratoj, karaj gesamideanoj!

Demandis min foje en la lernejo, dum leciono, malgranda knabineto:”Pri kio pleje sopiras Dio?”.

En tiu demando estis sincera kaj profunda scivolo.

Hodiaŭ mi volus tiun demandon ripeti, prefere kiel provokon: ”Pri kio pleje Dio sopiras?”

La plej granda sopiro de Dio, se ni tion povas iel antropomorfe diri, estas transdoni sin..., transdonadi sin! La Patro deeterne transdonas ĉion al la Filo, kaj la Filo ĉion senĉese redonadas al la Patro, en la Sankta Spirito.

La Filo estas nomata*”Logos”*,”Vorto de la Patro”, per kiu Li esprimadas sin. Tiun sian Vorton Dio al ni eldiris en la mondo... Nian mondon!

La homo estas kreita laŭ bildo, laŭ modelo de Dio; tio signifas, ke ankaŭ la homo havas profunde, en sian koron, enkorigitan sopiron esprimadi sin, eldiri sin, esti de la aliuloj “komprenita” kaj “akceptita”, kaj tiamaniere eniradi en la komunumon kun ili.

Esprimadi sin, eldiradi sin, do estas la profunda homa vivsopiro. Ĝi estas rebrilo de la Dia sopiro; ĝi estas la pratempa plano de Dio pri la homo, al kiu Dio enigis en la koron tiun ĉi sopiron.

Tiun Dian planon, altiri la homon en la plej profundan komunumon kun Si mem, kaj krei ”dian” etoson de Paradizo ankaŭ inter la

homoj, tiun planon la homoj tuj komence neniigis! En Babilono tiu ĉi detruo de la Komunumo penetris en la interhomajn rilatojn.

Dio, kiu pensas pri ideoj de paco, renovigis ĉi tiun deorigine planitan kunecon kaj interkomunikadon inter Dio kaj la homoj, per disverŝado de la Amo dum la Pentekosta miraklo en Jerusalemo, kie tiam amasiĝis anoj de ĉirkaŭ dekkvin nacioj, kaj ĉiuj ekvidis estontan reciprokan interkompreniĝon en Dio pere de la Sankta Spirito kaj Lia Amo.

La kreo de Esperanto estas esprimo de la plenumado de la homa sopiro interkompreniĝi kaj forigadi barierojn de la komunikado kaj tiun sopiron oni povas, laŭ certa vidpunkto, kompari kun la nuntempa profunda sopiro de la homaro pri unuiĝo, en la sferoj de scienco kaj tekniko, en la sferoj politika kaj ekonomia. Esperanto estis kreita en la tempo, kiam ĉi tie la nuntempaj grandaj kongresaj sopiroj kaj celadoj ankoraŭ ne ekzistis.

Spite de ekzistanta kaj ofte nevenkebla diverseco de situacioj kai diferencoj inter la homoj kaj la popoloj, en la profundeco certe resonas ĉi tie la eĥo de la hodiaŭa sentemo pri la ”homaj rajtoj” ankaŭ en tiu sfero.

Ne nur ĉiu kredanta homo, sed ankaŭ ĉiu homo de bona volo ne povas ne vidi la ”signojn de la tempoj”, kaj tial parto de la homaro ne povas ne senti profundan sopiron forigi la dividitecon, la malamon kaj la ”kulturon de morto”, kaj eĉ sopiron atingi interproksimiĝon, interkompreniĝon kaj unuecon en la Amo, kaj sopiron konstrui la Civilizacion de la Amo kaj Vivo!

Tio ĉi estas la plej ĉefa tasko de ĉiu hodiaŭa kristano, kaj en tiu kunteksto oni devas kompreni la strebadon de la esperantistoj, kaj precipe de la *katolikaj* esperantistoj, ne nur kiel interesan ”ludon”, kiel... ”hobion”, sed precipe kiel parton de la tutmondaj sopiroj kaj klopodoj forigi la barierojn, atingi la ”unuecon!”.

Sed, antaŭ ĉio, oni devas tion kompreni kiel efektivigadon de la pratempa Dia plano, eldirita per la Vorto de Dio, Jesuo Kristo, ”por ke ĉiuj estu unu!”.

Tiel profunde, mi petas, komprenu vian mision!

En tiu spirito, mi al vi por ĉiu via strebado dankas, kaj kune kun vi por la sukceso de via laboro mi nun preĝos! Amen. ■

## NI FIDU AL DIA MIZERIKORDO

Kion al Vi ni donu,
Sinjoro kara kaj mizerikorda?
Kiel ni petu pardonon
pro niaj pekoj, la agado senorda?

Konsidere al via mizerikord´ senfina,
al via am´ kompatema,
bonaj intencoj niaj
ne estas rekompenco plena.

Malgraŭ nia malforto,
malgraŭ nia pekemo,
ni fidu al Dia mizerikordo,
ni enprofundiĝu en Dia kompatemo!

„Maltrankvila estas nia koro,
ĝis kiam ĝi ripozos en Vi“ –
la vortoj de sankta Aŭgusteno
nun estu inspiro al ni!

Niaj koroj ankaŭ sopiras al Kristo,
al la Tron´ de l´ Mizerikorda Amo,
al kara kaj bona Paŝtisto,
al la el ĉiel´ iranta viva Pano.

Jesuo, plena de l´ Mizerikorda Amo,
per viaj Korpo kaj Sango sanktaj
profundigu nin en la gracofontanoj,
donu al ni la vivon en la tago lasta!

*Zofia Kamieniecka*

## 50 jarojn post Populorum progressio (26.3.1967)
# LA FORGESITA ENCIKLIKO

Se estas vere, ke Paŭlo la 6-a estas Papo fora en la tempo kaj fakte forgesita, la samo okazas por unu el liaj pli karakterizaj dokumentoj, enciklikо *Populorum Progressio* (pri la evoluo de la popoloj). Publikigita antaŭ duona jarcento, la teksto datiĝas la 26-an de marto 1967, Paskofeston, kaj ĝi estigis en la mondo grandegan reeĥon, egalan nur al la kontrastoj, kiujn estigos unu jaron kaj duonon poste enciklikо Humanae Vitae pri la natura naskokontrolo. Ne hazarde, ĝuste pri ĉi tiuj du dokumentoj Montini reparolis kun aparta akcento farante solenan bilancon pri sia papado la 29-an de junio 1978, kiam «la natura irado de nia vivo turniĝas al la krepusko», diris la Papo, kiu mortis kvardek tagojn poste, preskaŭ abrupte.




Dum la parolado Paŭlo la 6-a deklaris, ke la du enciklikoj volis defendi la homan vivon «minacatan, pertubitan aŭ eĉ mortigitan»: ĝi estis elekto difinita nepra de la Papo kadre de lia instruado por servi la veron. Tuj post la fino de la Koncilio, ĝuste la nova ekkonscio pri la postuloj de la evangelia mesaĝo devigas la Eklezion «metiĝi je la servo al la homoj» skribis fakte la Papo komence de sia teksto, pretigita dank' al diversaj kunlaborantoj, sed sendiskute lia laŭ la inspiro, pro la multaj akcentoj kaj laŭ la lingvaĵo, pasioplena kaj elvokiva.

Kiel ofte okazas en la kristana tradicio, malnovaj kaj novaj elementoj miksiĝas en *Populorum progressio*, teksto elradike evangelia, kiu kapablas efike unuigi per longvida rigardo la personan sperton de Montini, la kontribuojn de la nuntempa penso, la socialan instruadon de la Papoj kaj la konsiderojn de la kristanaj verkistoj. "La tero estas donita al ĉiuj kaj ne nur al la riĉuloj", diras Ambrozio, la sankta episkopo de Milano, citita de la encikliko, kiu tuj klarigas kiel la rajto de propraĵo neniam devas esti praktikata por difekti la komunan bonfarton, ĝuste "laŭ la tradicia doktrino de la ekleziaj patroj kaj la grandaj teologoj".

La papa teksto, konceptita kaj evoluinta en la fruaj sesdekaj jaroj, vidas klare, ke la sociala demando ne nur estas morala afero, sed ĝi havas "tutmondan dimension". Montini eksplicite rilatas al siaj vojaĝoj al Latinameriko kaj Afriko, kiam li estis kardinalo, kaj al tiuj al Sankta Lando, Hindio kaj al la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj Nov-Jorko, kiel posteulo de Petro kiu elektis la nomon Paŭlo, por komprenigi al ĉiuj unu el pli trafaj deklaroj de la encikliko – «La popoloj malsataj hodiaŭ urĝe kaj impete postulas helpon de la popoloj, kiuj havas abundon» – kaj por deklari sin «advokato de la malriĉuloj».

Duona jarcento pasis ekde la publikigo de Populorum Progressio, kaj ĝenerale la vidpunkto de Montini restas valida en sia tragika kaj neta diagnozo: «La mondo estas malsana. Ĝia malsano konsistas malpli en la elsekiĝo de la fontoj aŭ en ilia alproprigo fare de kelkaj, ol en la manko de frateco inter la homoj kaj la popoloj». Hodiaŭ, kvankam nekomprenita de multaj, tion ripetas senlace lia posteulo, kiu restarigas la rememoron pri Paŭlo la 6-a. ■

La teksto de la encikliko *Populorum Progressio* estas legebla en la paĝaro de IKUE:
**http://www.ikue.org/papoj/paulovi/1967/enciklikopp.html**

# PRI LA AKTUALA KAJ MONDVASTA T.N. GENRISMA IDEOLOGIO (Gender Mainstreaming)

**Prelego de la komitatano de IKUE Stefan Lepping prezentita en la 20-a EEK en Trento-Cadine la 21-an de aŭgusto 2014**



Karaj gesamideanoj, mi volas prelegi pri la aktuala kaj mondvasta t.n. Genrisma Ideologio (anglalingve „Gender Mainstreaming” – proksimuma traduko: genrisma ĉefopinio). Tiu ideologio estas ankoraŭ multe pli danĝera kaj pereiga ol la komunisma ideologio de Karl Marx. Jam tiu ĉi lasta kaŭzis milionojn da mortigoj kaj ĝis hodiaŭ influas mondskale al militado kun sennombraj viktimoj, kvankam kiel politika sistemo ĝi kolapsis en Orienteŭropo ĉirkaŭ la 1990aj jaroj. Krom la sangofluado kaj tombejoj, vere nemezurebla estas la, kelkfoje subtila, efiko de la komunisma ideologio al la animoj: plivastigo de ateismo, flanken-puŝo kaj detruo de la kristana religio de ekstere kaj de interne, kun multfacetaj sekvoj ankaŭ videblaj, ekz. la disfalo de la familioj, kiel natura, plej malgranda ĉelo de la socio.

Fakte, la Genrisma Ideologio estas iusence daŭrigo kaj plu-evoluo de la fi-intencoj, kiuj jam troviĝas en la ideoj de Marx. Ĝi estas batalo kontraŭ la familio, kontraŭ la homo kiel kreitaĵo, kontraŭ ĉiaj sanaj kaj liberigaj interhomaj rilatoj, kontraŭ la eklezio, kontraŭ Dio. Ĝi tamen ŝajnigas batali por la homo, por lia libereco, por lia memdifino. Kvankam ĝi jam aktivas ekde multaj jaroj en preskaŭ ĉiuj registaroj kaj mondvastaj organizaĵoj, ĝi ankoraŭ ne estas konata de multegaj homoj en kaj ekster la eklezio, ĉar ĝi aktivas kaŝe. Laŭ mia scio, nur la episkoparoj de Pollando, Slovakio kaj Italio ĝis nun publike kaj unuanime kondamnis tiun ideologion; la aliaj ĉu ankoraŭ dormas, ĉu timas la proteston kaj kalumniadon flanke de televido, gazetaro, interreto, kiuj jam enhavas grandan parton da genrismaj aktivuloj. Papo Francisko mem jam publike nomis la Genrisman Ideologion demona kaj diabla. Fakte, kiel mi jam diris, tute ne estas afero, kiu nur koncernus la katolikan eklezion; la Genrisma Doktrino koncernas kaj minacas la tutan socion! Malofte ĝiaj parte absurdaj postuloj estas malkaŝe diskutataj. Jam nun granda amaso de la homaro ne plu ribelas aŭ reagas, se ĝi nur havas „Panon kaj Ludojn”, kiel en la lastaj tagoj de la romia imperio... La indiferenteco pensigis germanojn al simila situacio antaŭ la Hitlera reĝimo; ankaŭ tiam la mortiga rasisma ideologio estis nur tre malfrue diskutata kaj komprenita en sia absurdeco. Homoj pensas, ke ni ja vivas en libera kaj justa socio, ĉiu ja estas rigardata kiel egalrajta... Ĉiu ja povas libere fari sian propran feliĉon... Kie do estas la problemo?

La problemo estas miskompreno aŭ eĉ falsigo de la vero pri la homo. Cetere, ne nur de la religia vero. Ankaŭ ekzemple la faktoj de biologio estas klare refutataj de genristoj! Ne nur laŭ la komuna juda-kristana tradicio, ankaŭ laŭ la naturo, estas evidente, ke la specio „Homo” ekzistas nur aŭ en vira, aŭ en virina formo. (Ekzistas tre malmultaj homoj, kiuj laŭ sia biologio ne klare estas unu el la du. La genristoj tre grandigas tiun fenome-

non kaj faras dubindajn konkludojn el ĝi.) En ĉiu socio, en ĉiu familio, viroj kaj virinoj vivas kune, oni povas diri, komplementaj; ofte ili estas en iu interdependeco, el kiu ambaŭ profitas. Evidente, nur per seksuma kunestado de viroj kaj virinoj, la homa specio daŭras po unu generacion pli; el la dualeco inter patro kaj patrino, la knabo aŭ knabino trovas sian propran identecon. Tial ankaŭ estas kutime, en ĉiaj sanaj socioj kaj kulturoj de la mondo, ke la gepatroj restadas kune, en fidela kaj dumviva amo. Pro biologiaj kaŭzoj, la patrino en la unuaj jaroj estas pli ligita al la infanoj ol la patro. En la tempo de plenkreskiĝo la patro ludas gravan rolon en la liberiĝo de la patrino kaj kondukas la junulojn al la mondo.

La Genrisma Ideologio volas ignori tiajn faktojn. Laŭ ili, temas pri nure sociaj kaŭzoj, kiuj malhelpus la virinojn same „libere” fari iun laboron ekster la familio. Ili propagandas la idealon, ke bona virino estu aktiva en la mondo; aktiveco en la familio nur estas honorinda, se ĝi ne malhelpas la mondan karieron. En ĉi tiu punkto oni devas atenti, ke temas ne nepre pri malvero, sed pri troigo: Estas bone, ke virinoj donu siajn talentojn ankaŭ en mondaj profesioj, speciale se ili havas eksterordinarajn talentojn, kaj speciale se ili estas liberaj de familiaj devoj. Sed la instruado kaj edukado de la propraj infanoj estas la unua natura rajto kaj devo de ĉiuj gepatroj. En sciencaj studoj de la situacio en Svedio, kie jam delonge infanoj estas tre frue forprenataj de la patrinoj, kaj donataj al ŝtate kontrolitaj vartejoj, oni scias, ke la frua apartigo de la propra patrino ofte estas sufero por infanoj kaj kaŭzas psikajn vundojn, kiuj povas negative influi la tutan vivon. Infanoj estas ofte rigardataj ne kiel bonvenigindaj novaj homoj, kun senlima homa digno, sed kiel problemo por la „libereco” de la gepatroj! Aliflanke, oni respektas, ke ili povas signifi valoran sencon en la persona vivo, tamen nur se ili estas planitaj kaj deziritaj. Tial la batalo por abortigo estas ankaŭ parto de la Genrisma strategio.

La natura interrilato inter seksuma vivo kaj generado de idoj povis esti disŝirita nur per la komenco de la t.n. Seksuma Liberigo, kiu estis parto de la studentaj kaj aliaj revolucioj en la jaro 1968. En orienta Eŭropo, tio estis jaro de sopiro al libereco, en Okcidento ankaŭ; tamen kio estas vera libereco, tio estis ofte miskomprenata, kaj ofte gvidis al alia formo de sklaveco. Materia antaŭkondiĉo de la Seksuma Revolucio estis la invento de la kontraŭ-koncipa pilolo, kiu steriligas la seksuman agon de virinoj kaj viroj. Nur per la iom-post-ioma kutimiĝo al la libera seksumado, kiu fakte tre rapide forviŝis la kutiman kristanan moralon de ĉasteco ekster la geedzeco, dua ŝtupo de la Genrismo fariĝis publike akceptebla: La agnosko de samseksamaj rilatoj kiel tute egalaj al intergeedzaj rilatoj, kondiĉe ke ili estu fidelaj. El tio sekvis, mondvaste, la postulo de la politika samrajtigo; baldaŭ poste la postulo de rajto je adoptado de infanoj – denove sen demandi la infanojn. Aferoj, agoj, kondutoj, kiuj antaŭ malmultaj jaroj ankoraŭ ŝajnus al ĉiuj hontindaj, nun en la t.n. Christopher Street Day en pompa kaj fanfarona procesio estas prezentataj al la publiko, kun postulo, ke oni trovu tion tute normala. Eĉ samseksamuloj, kiuj sentas, ke ilia deziro ne kondukas ilin al feliĉa kaj normala vivo, ne rajtas serĉi helpon aŭ eliron el sia situacio; homoj, kiuj pretas helpi ilin, same estas rigore atakataj. Kvankam la problemo, laŭ mia propra konvinko, estas interna, oni kredigas al si kaj al ĉiuj, ke la kaŭzo por eventuala nefeliĉo de samseksamuloj estas nur la malbona socio, pli precize: la homoj, kiuj ne ŝatas aplaŭdi kaj laŭdi ilin pro ilia „kuraĝo”, ke ili malkaŝe, ofte fanfarone, vivas tion. Do, ties vidpunkton oni devas ekstermi; por tio oni inventis novan vorton: „homofobio”, t.e. malŝato aŭ naŭzo fronte al samseksamo, kiu en multaj landoj jam estas krimo punenda! Sed eĉ se oni – kiel kristanoj devus – respektas kaj toleras samseksamulojn, sed nur

ne volas kunagi en tiu stranga glorado kaj propagandado de tiu formo de seksumado, oni jam povas akiri la etikedon „homofobiulo”. Sufiĉas, ke oni diru, ke laŭ la naturo tiu seksuma ago ja nepre estas senfrukta. Por tio oni ja povas adopti infanojn. La plej grava afero ekde 1968 fariĝis, ke la individuoj – plenkreskuloj – havu plezuron. Oni egaligis la naturan seksuman deziron al la natura manĝa kaj trinka deziro, tiel ke sindetenado de seksumado farus homojn malsanaj, almenaŭ malfeliĉaj. Kaj do: jen nova konkludo kaj ŝtupo: kontraŭi senliman seksuman liberecon estus kontraŭ la homaj rajtoj, ĉar ja ĉiu homo havas la rajton esti feliĉa. Karaj gesamideanoj, tio ne estas strangaj rezonadoj kaj konkludoj de mi, tio estas mondvasta politiko, kiu estis infiltrita per la t.n. Jogjakarta-Principoj eĉ en la internacian juron kaj la aktuala kompreno de homaj rajtoj. Nekredeble, kaj skandale, ke tiom malmultaj protestas.

Samseksamo antaŭ kelkaj jardekoj ankoraŭ estis rigardata kaj sentata kiel iomete stranga kaj eble perversa: Eble estas iu progreso, ke ankaŭ ni, kristanoj, hodiaŭ ne plu tiel strikte juĝas homojn kun tiaj inklinoj. Ankaŭ Dio mem koncedas al ĉiu mem eltrovi la veron, eĉ se li erarus dumvoje; tamen kun Lia mizerikordo kaj toleremo, Li kuniras kaj ne ĉesas esperi gajni la koron kaj amon de la homo. Morala perfekteco ja ne estas la sola kaj plej grava kriterio, kiu necesas en kristanismo, estas la rilato, kredo, kaj la amo al Kristo, do la amo al Dio, per tuta koro, per tuta animo kaj tuta povo. Kaj la amo al la proksimulo kiel al si mem. Tamen, la misuzado de la seksuma forto havas la tendencon enfermi la homon en sin mem, koncentri lin al sia propra karna deziro, anstataŭ al bezonoj de la aliaj, al tuteca kaj ekvilibra amo. Do la sekvoj de la propagandado de samseksamo fare de la genristoj certe havos tre negativajn sekvojn, speciale ankaŭ por la infanoj kaj la junularo, kiuj ankoraŭ ne trovis sian plenkreskulan identecon. Jam al la infanoj oni volas trudi la genrisman ideologion en lernejoj, kaj eĉ jam en vartejoj, en amaskomunikiloj... Estas jam nun tre malfacile eduki infanojn al memstaraj kristanoj, pro tiom da, eĉ leĝe trudita, konfuzo, fare de tiuj, kiuj havus la devon eduki kaj klerigi la junularon.

Sed: Ĝenerala akcepto kaj ŝato de samseksamo, kaj ridetado pri la enuiga, normalaĉa versio de seksumado ene de geedzeca vivo, nur estas unu ŝtupo en la evoluo de genrismo. Ankaŭ agoj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ estas rigardataj kiel perversaj, parte krimaj, kiel eble plej baldaŭ estu rigardataj kiel normalaj, se nur homoj volas tion – pedofilio: do seksumado de plenkreskuloj kun infanoj, incesto – do seksumado kun plej proksimaj parencoj, zoofilio – do seksumado kun bestoj, kaj – preskaŭ jam akceptata – sadomasoĥismo. La t.n. seksuma liberigo estas, laŭ genristoj, jam nun predikenda kaj instruenda ankaŭ al infanoj kaj gejunuloj, por ke ili perdu ĉiujn negativajn antaŭjuĝojn al tiuj kompatinduloj, kiuj jam estas kaptitaj en tiuj seksumaj misvojoj, kaj por ke la infanoj kaj gejunuloj libere elektu kaj elprovu, kio plaĉos al ili. Ĉu seksumado, kiel natura kaj bela parto de daŭra feliĉa geedza rilato, kun malfermeco al naturaj infanoj? Tio fariĝis stranga kaj neinteresa varianto, de nostalgiuloj... Kiel la socio pluvivos tion? La eklezio pluvivos – kondiĉe, ke ĝi restos fidela al siaj propraj idealoj. Sed povas okazi, ke ĝi pro tio baldaŭ estos persekutata ankoraŭ multe pli akre. Jam nun, la rajto je libera vivado de sia religio, estas taksata kiel subordigita al la devo, respekti „seksuman diversecon”... Sed Dio havas la potencon savi sian popolon, kaj trovi vojon de Vivo kaj Espero eĉ meze de senvoja dezerto.

Por la socio kaj la unuopa homo estas konkreta triobla minaco de mallibereco, malgraŭ tiu brua promesado de senlima libereco:

Unue: Jam Marx kaj Lenin sciis, ke homo karna, kiu interesiĝas ĉefe al la kvietigo de siaj karnaj aŭ voluptaj deziroj, estas tre facile

regebla kaj dirigebla per donado aŭ forpreno de tio, kion lia karno deziras. Rezigno estus por tia homo la plej granda malfeliĉo, kaj li oferus por la venonta ĝuo ĉion. Ankaŭ fizike, bioĥemie, aŭ elektronike, oni povas jam nun starigi artefaritajn sentojn de bonsento aŭ malbonsento per la sensoj. Se tio kuniros kun eŭropovasta aŭ mondvasta kontrolado pere de modernaj elektronikaj iloj, kaj eble korpa enplantado de la ĉipoj komputilaj, kiuj jam ekzistas en multaj kartoj, perfekta sklaveco de la homamasoj estus jam atingita. Tio, cetere, estas profetita en la apokalipso de Johano. Interese, ke la ĉefkomputilego en Bruselo havas la moknomon „La Besto", kiu en Apokalipso estas nomo por la adorata idolo. Sed tiu temo nun kondukas tro for.

Due: La libereco de penso kaj konscienco jam nun estas severe limigata. Eĉ en la katolika Pollando renoma kaj bonega ĉefkuracisto ne rajtas ne fari abortigojn, sed estas kun indigno maldungata, kun granda tumulto en la amaskomunikiloj. Ni ne perdu la tempon eluzadi nian liberecon de libera esprimado de opinio, klare, tamen ĝentile, tiel longe, dum ni ankoraŭ havos tiun liberecon! Fakte, en Kristo neniu povas vere forpreni de ni tiun liberecon. Mi ankaŭ pensas, ke kuraĝeco, eĉ de malmultaj, povas tre ĝeni kaj malrapidigi tiun fi-evoluon planitan de Gender Mainstreaming! Kiel kristanoj ni ne estu fatalismaj. Nia ĉiopova Dio povas ĉiam ankoraŭ ŝanĝi minacegojn, se homoj konvertiĝas, kaj tio povas krei procesojn kun efiko de Domino-ludo: Ĉenaj reakcioj, kiuj povas efiki ne nur en la negativa kampo, sed des pli en la pozitiva, ĉar tion akompanas la Dia graco!

Trie, estas vere kompatinda mallibereco de unuopuloj, kaj tiu laŭ nia kristana vidpunkto eble eĉ estas la plej bedaŭrinda. Ĝi konsistas en tio, ke homoj lernas la kutimon sekvadi ĉiam la voluptajn dezirojn, sen demandi, ĉu ili estas bonaj aŭ malbonaj, ĉu ili kondukos al vivo aŭ al morto. Ili supraĵe pensas, ke ili faras sian propran volon, sed envere, ili estas tute kaptitaj kaj gvidataj de siaj voluptaj instinktoj, kvazaŭ bestoj. Tia vivmaniero detruas la kapablon sincere ami, ĝi detruas la ekvilibron ami sian proksimulon kaj sin mem; por Dio kaj por la graco de Kristo, eĉ por bonvolaj kun-homoj estos malfacile enpenetri en tiajn „vivojn", kiuj satelitas nur ĉirkaŭ si mem. Tamen, oni povas diri kun sankta Paŭlo: Kiam la malgraco fariĝis granda, la graco fariĝis ankoraŭ pli abunda. Se iu volas saviĝi, li povos; la mizerikordo de Dio estas neelĉerpebla kaj nekomprenebla. Sed misgvidado en tiu kampo de seksumado kaj ĉasteco kaŭzos al la homoj multe da vundoj, malĝojoj, egoismo, detruitaj rilatoj – familiaj kaj aliaj, ĝi povas kaŭzi ankaŭ mizeron fizikan kaj ĉiuspecajn suferojn, eble sociajn revoltojn... Mi kiel kristano volas ne senkuraĝigi iun ajn; mi firme kredas, ke ekzistas elirvojo por unuopuloj kaj por ĉiuj homoj de bona volo. Tamen por ne esti naiva, mi sentis ĝin mia devo, diskonigi al vi, miaj gesamideanoj, la terurajn faktojn„ kiujn mi eksciis pri Gender Mainstreaming, kaj komprenigi la realajn minacojn, kiuj minacas nin en nia nuntempo. Por ni mem, ni ne tro timu, dum ni restas sur la Vojo, kiu estas Jesuo Kristo. Li estas ankaŭ la Vero, Vivo, kaj Resurekto. Proksimulojn ni povas averti; laŭ nia kapablo kaj oportunecoj ni povas atesti eble ankaŭ en pli vasta skalo. La mondon devos savi ne ni; ni trankvile konfidu ĉion, kio superas niajn fortojn kaj nian kompetentecon, al la Dia providenco. Kaj kun niaj amikoj kaj proksimuloj ni firme konfidu al la promeso de Jesuo: „Kie ajn du aŭ tri kunestas en mia nomo, Mi estos meze de ili. Mi estos ĉe vi, ĉiutage, ĝis la fino de la mondo." Same ne pereos la bela vorto el la Psalmo 133: „Jen kiel bone kaj ĉarme estas, se (ge)fratoj vivas kune! Kiel la bona oleo, kiu de la kapo defluas sur la barbon, la barbon de Aaron... Ĉar tie la Eternulo donas la benon, Vivon por eterne." ■

## LASTA LUKTO OKAZOS PRO GEEDZECO KAJ FAMILIO, KONFIDIS SIN AL KARDINALO LA VIZIULINO EL FATIMO

Fratulino Lucia dos Santos, unu el tri infanoj, kiuj estis atestantoj de la aperoj de Maria en Fatimo, mortis en la jaro 2005. Sed ankoraŭ antaŭ sia morto ŝi antaŭdiris, ke lasta lukto inter Kristo kaj Satano okazos pro geedzeco kaj familio. Tion diras kardinalo Carlo Caffarra, kiu sciigas, ke la viziulino skribis al li leteron kun tiu ĉi mesaĝo, kiam li estis ĉefepiskopo de Bologno en Italio.



*Lucia dos Santos*

Deklaron de la fratulino Lucia, kiun ŝi eldiris dum pontifikeco de Johano Paŭlo la Dua, denove publikigis meksikia semajngazeto *Desde la Fe* kiel reagon je eldiro de prezidento Enrique Peña Nieto, kiu anoncis, ke li subtenos edzecon inter samseksemuloj en Meksikio. La meksikia semajngazeto memorigis deklaron de la kardinalo Caffarra por itala gazetaro el la jaro 2008, tri jarojn post morto de fratulino Lucia.

En la 16-a de februaro 2008 la itala kardinalo celebris la sanktan meson ĉe tombo de la sankta Patro Pio kaj poste li disponigis interparolon por *Tele Radio Padre Pio*. Li estis demandita pri profetaĵo de la fratulino Lucia dos Santos, kiu parolas pri „lasta lukto inter la Sinjoro kaj regno de Satano". La kardinalo Caffarra eksplikis, ke la s-ta Johano Paŭlo la Dua lin komisiis, ke li fondu Papan Instituton por Studo de Geedzeco kaj Familio. Komence de tiu ĉi misio la kardinalo sendis al fratulino Lucia el Fatimo leteron pere de ŝia episkopo, kiam li tion ne povis rekte fari. „Kvankam mi ne atendis, ke ŝi respondos al mi, ĉar mi ŝin petis nur pri ŝiaj preĝoj, venis al mi el neklarigeblaj kaŭzoj letero kun ŝia subskribo, kiu nun troviĝas en arkivo de la instituto," diris la kardinalo. En la letero estis jena skribaĵo: „Lasta lukto inter la Sinjoro kaj regno de Satano okazos pro geedzeco kaj familio. Ne timu. Ĉiu, kiu strebos pri sankteco de la geedzeco kaj familio, havos kontraŭlojn kaj oponulojn, ĉar tio estas decidema demando." Poste ŝi aldonis: „Sed la Virgulino Maria jam frakasis kapon de la Satano."

La kardinalo Caffara diris, ke post tio, kiam li „denove parolis kun Johano Paŭlo la Dua, li estas konvinkita, ke la familio estas kerno de la konflikto, ĉar ĝi estas porta piliero de ka kreitaro. Ĝi estas vera rilato inter viro kaj virino kaj generacioj. Se oni detruos fundamentan pilieron, ruiniĝos la tuta konstruaĵo. De tio ni estas atestantoj en la nuna tempo. Ĵus ni troviĝas en tiu ĉi baza punkto kaj ni tion scias."

La kardinalo aldonis: „Mi estas kortuŝita, legante la biografion de la Patro Pio kaj mi sciiĝas, kiel tre grava por li estis sankteco de geedzeco kaj sakramento de geedzoj spite de motivitaj obstakloj." ■

*Fonto: Catholic News Agency, 8.7.2016*

## SINKONSEKRO DE ESPERANTISTOJ AL VIRGULINO MARIA

Ni petas Vin, Virgulino Maria, Patrino de la Eklezio, Patrino de la bona konsilo, estu nia Perantino ĉe via kaj Dia Filo kaj konduku nin al Li. Ĉiam al ni montradu, kiel ni devas vivi kaj servi al homoj kaj al homaro en ĉiu nacio, kiel ĉiujn gvidi laŭ vojo de Spirito, kiel garantii en la mondo justecon kaj pacon.

Tial ni al Vi hodiaŭ konsekras nin kaj ankaŭ la tutan nian kaj tutmondan Esperantan movadon kun ĉiuj ĝiaj taskoj kaj en senlima fido ni metas ĝin en viajn patrinajn manojn. Amen.

*(Verkita de la ĉefepiskopo Karel Otčenášek speciale por esperantistoj.)*

# FRANCAJ EPISKOPOJ PRI EŬTANAZIO:
## Ni konstruas socion eliminantan malfortulojn


**Francio.** Mortigado nome de kompato ne estas ago de vera zorgo pri la alia homo – skribas francaj episkopoj. En sia plenkunsido en Lurdo ili decidis klare esprimi negativan sintenon de la katolika eklezio rilate al intenco de revizio de la leĝo pri fino de la vivo. Rapido, per kiu volas leĝdonantoj revizii normon aprobitan apenaŭ antaŭ du jaroj, atestas laŭ la episkopoj pri la intenco laŭeble plej rapide akceptigi eŭtanazion. Spite de la antaŭaj deklaroj ne okazis disvolviĝo de la paliativaj terapioj, kiuj estas por multaj pacientoj daŭre neatingeblaj. Parolas episkopo Olivier de Germay:


Episkopo Olivier de Germay

*"Miaopinie malantaŭ la demando de eŭtanazio – kaj en pli larĝa horizonto ankaŭ malantaŭ la pluaj intencoj pri revizio de la leĝo pri bioetikaj aferoj, ekestas la demando pri loko de malfortuloj kaj malsanuloj en la socio. Ĉu ni eble ne strebas pri la socio, en kiu ne estas loko por malforteco, por homoj iamaniere malfortaj, inkluzive de tiuj, kiuj povus naskiĝi iamaniere neperfektaj kaj tial ili devus esti antaŭdestinitaj por forigo ankoraŭ antaŭ la naskiĝo? Ĉu ni en Francio ankoraŭ sukcesas regi la homan malfortecon, ĉu ni konsciiĝas, ke la homa malforteco estas por la socio ŝanco, ĉar ĝi permesas al ĝi zorgeme rilati tiujn, kiuj estas plej sentemaj kaj plej vundemaj?"* – diris en interparolo por Vatikana Radio episkopo Germay, 23.3.2018. ■

# LA MURO DE LAMENTADOJ

En Jerusalemo staras muro de lamentadoj. Ĝi estas konservata surbaze de spertoj, ke la homo bezonas iun lokon, kie li povas lamenti, kie li povas plori, kiam trafis lin grava doloro aŭ sufero. La muro de lamentadoj povas esti eĉ iu homo, kiu aŭskultas, ĉe kiu mi povas plendi kaj plori. Se iu retenas al si la doloron kaj suferon, en si li sin mordas, li kaŭzas al si ĝenaĵojn kaj la malsano pli malboniĝas. Plendi kaj plori, eldiri, kiel la homo sin sentas, efikas plibonigon. Tio povas esti la unua paŝo, kiel paciĝi kun la situacio. Tio povas alporti plifaciligon kaj kaŭzi, ke ni la doloron kapablas elteni kaj diri „jes“ al grava, nekomprenebla vizito. – La preĝejo (kapelo) povas esti la loko de la lamentadoj. Tie ekzistas eblo trovi kuraĝigon, en la momentoj de silento konsciiĝi pri sia premanta situacio. Elparoli sian doloron, kiun ni antaŭ la mondo ŝlosis kaj diri: „Mi ne plu tion kapablas toleri. Mi lamentas antaŭ Vi, mia Dio!“


Kard. Pierre Veuillot

„Ni ne malŝparu la vortojn pri la sufero, kiam ni ne scias, kio la sufero estas.

Kiam mi vere ĝin ekkonis, mi nur kapablis plori.“

Kvankam la sufero ŝajnas esti nekomunikebla kaj nedifinebla, tamen ĝi devus esti pli multe priparolata, pripensata kaj komprenata. Primedito de la sufero en la tempo, kiam ni estas sanaj kaj „feliĉaj“, havas sian sencon. Tiel ni povas la suferon enpreni en tuton de nia vivo. En la periodoj de la krizo do estas por ni portebla tio, kion ni jam en la vivo proprigis al ni. ■

## PRINCO DE LA ĈIELAJ LEGIAROJ

Ĝis ŝanĝo de liturgia kalendaro havis ĉiu el tri ĉefanĝeloj sian apartan festotagon. La festotagon de sankta ĉefanĝelo Gabrielo oni festis unu tagon antaŭ la festo de Anunciacio, feston de sankta Rafaelo la 24-an de oktobro kaj feston de sankta Miĥaelo ĉefanĝelo la 8-an de majo.

Tiu dato interrilatis kun la apero de sankta Miĥaelo sur la monto Gargano en Manfredonio en suda Italio. Tiuloke poste li aperis en tri diversaj periodoj. Unuan fojon en la jaroj 490-495, kiam li trifoje aperis al loka episkopo L. Maloriani, unuan fojon ĝuste en la 8-a de majo 490, kiam li indikis al li groton, kiun li mem elektis kiel sian sanktejon, por ĝin transdoni al kristana kulto. Tiu „ĉiela baziliko“ sur la monto Gargano en Manfredonio situas 50 km for de la tombo de Patro Pio estanta hodiaŭ celo de ĉiam pli multnombraj pilgrimantoj. La dua apero ĉi tie okazis la 29-an de septembro 492, kiu kaŭzis forkuron de gota armeo tendumanta sur deklivo de la monto. Dum la granda dankprocesio, kiu poste almigris la monton, neniu kuraĝis eniri la groton de sankta Miĥaelo. Dum la tria apero en la 28-a de septembro 493 diris sankta Miĥaelo al la episkopo, ke ne estas necese, ke li sanktigu la groton: »Mi mem kun miaj anĝeloj ĝin sanktigis. Kiel signon de tio vi trovos klaran signon de la sanktigo: la altaron.«

Plua apero tie okazis en la jaro 1022, kiam tie mirakle estis resanigita bavaria grafo Erich Hinkende. Atestanto de la apero estis mem imperiestro, kiu tiam batalis kontraŭ grekoj ekatakantaj sudan Italion.

En la jaro 1656, kiam la tutan Italion atakis pesta epidemio, ordonis episkopo Pulcinelli tritagan faston kaj pilgrimon al la groto de sankta Miĥaelo. En tiu pilgrimo sankta Miĥaelo aperis la 22-an de septembro al la episkopo dum lia preĝo kaj ordonis al li, ke li en ĉiun familion transdonu ŝtoneton el la groto signitan per gravuritaj simboloj S+M. Li ankaŭ antaŭdiris tertremon, kiu okazis la 17-an de oktobro 1656 kaj dum kiu estis Manfredonio evitita.



*Sankta ĉefanĝelo Miĥaelo sur Anĝela Kastelo en Romo*

En plua tertremo en la jaro 1688 restis la statuo de s-ta Miĥaelo super portalo nedifektita, sed ne la statuo de drako ĉe liaj piedoj.

Sankta ĉefanĝelo Miĥaelo havas ankoraŭ pluajn gravajn pilgrimlokojn sur la mapo de la mondo. Ĝuste cent jarojn post la apero de la Virgulino Maria en Guadalupe kaj cent kilometrojn suden de tiu pilgrimloko aperis sankta Miĥaelo en sia festotago la 8-an de majo 1631 en Capula al indiana indiĝeno Diego Lazar kaj montris al li ŝliman akvon, kiun li per lumo transformis je viva akvo, kaj elpelis demonojn, kiuj kontraŭstaris tion. La ĉefanĝelo Miĥaelo tiam kun granda severeco agis kontraŭ la viziulo, kiu pro timo rifuzis antaŭ gubernatoro montri la miraklan fonton al la publiko.

En la jaro 590 en tempo de la pesto aperis ĉefanĝelo Miĥaelo en Romo al papo Gregoro la Granda dum petema procesio sur supro de kastelo de Hadriano. Kiel signon, ke Romo estos senigita de la pestvundo, enmetis Miĥaelo en ingon sangmakulitan

glavon. La kastelo de Hadriano nun nomiĝas Anĝela kaj ĝi estas ornamita per granda statuo de sankta Miĥaelo ĉefanĝelo.

La eklezia historio ankoraŭ konas pluajn okazojn de la aperoj kaj intervenoj de tiu ĉi ĉiela princo de la ĉiela armeo. Lasta el ili okazis en la jaro 1966 en San Damiano (Perugia), kie la ĉefanĝelo Miĥaelo indikis lokon, kie oni serĉu fortan akvofonton, kiu poste fakte estis trovita. Verecon de tiu ĉi apero konfirmis Patro Pio. ■

*Laŭ eksterlandaj fontoj*

## Babits Mihály
## PSIĤOANALIZO KRISTANA

Kiel preĝaj sanktuloj staras en niĉoj
ekstere skulptitaj bele por okuloj,
sed ene al muro rigarde la dorso
nur fraŭkas kruda roko, malglata rompo:
Tiaj sanktaj estas ni!


El kia roko nia animo estas,
ke ĝiaj partoj ankoraŭ malglataj pendas,
malglate, malpure, duon-sennaskite,
kien Sun' ne brilas, nek rigard' alvenas?
Krist-Sinjoro helpu nin!

Pri piaj skulptistoj malnovaj ni aŭdis,
egalpacience kiuj ĉion skulptis,
ĉu estos videbla aŭ ne, ne pensante:
ĉion vidanta la Sinjoro, sciante:
Se nur ĉi tiaj estus ni!

Per ĉies okuloj mem la Dio vidas,
kaj kion en vi mem vi honte rigardas,
ankaŭ Di' rigardas, anim' mia sciu,
per viaj okuloj Dio vidas, tremu!
Krist-Sinjoro helpu nin!

Ho ve, kien rifuĝi, vi mem la pelisto
estas vi mem ja la spion' de l' juĝisto?!
Strute boras en sablaron de l' minutoj
nia stultkap', kaj tie trovos la morto.
Kio tiam iĝos ni?!

Senkonfesajn, blindajn, kun ŝlimo de l' jaroj
oni nin puŝos sur saman rubejon
kun kruĉo malbona, kio senlavite
refalos en teron por ĉiam ĵetite.
Krist-Sinjoro, helpu nin!



Kiu skulptos iam nin tute kompletaj,
se ve, al ni mankas ĉizilo forta,
nek ni havas ĉiam agantan martelon,
borantan brilon en doloregon?
Ni kreiĝis por sufer! :

Suferegi, same kiel triumfadi:
Ho kiom da akraj feroj devas skulptadi,
ĝis ni estos indaj, por ke nin la Reĝo
del' ĉiel' starigu en sia portiko.
Krist-Sinjoro helpu nin!

*Tradukis: sac. Lajos Kóbor 1960*

*Noto: iam la argila (el terofarita) kruĉo enhavis kugleton, por ke ĝi, moviĝante, ne lasu la akvon putriĝi.*

# FORLASIS NIN KAREGA SACERDOTO LAJOS KÓBOR
## (4.9.1937 - 29.4.2018)

Post longa malsano la 29-an de aprilo 2018 forpasis en ne ĝisvivita 81-jaraĝo sacerdoto Lajos Kóbor el Hungario. Kiel paroĥestro li dum multaj jaroj plenumis animzorgan servon en la hungara vilaĝo Pereszteg. En la jaro 2011 li celebris 50 jarojn de la sacerdotiĝo. Multajn jarojn li




*Pastroj Lajos Kóbor kaj Attila Szép mescelebras en Maria-pilgrimloko Máriagűd kadre de la 65-a IKUE-kongreso 2012 okazinta en Pécs*

estis membro de IKUE. Ekde la jaro 1979 li estis landa reprezentanto de IKUE por Hungario. Ankaŭ dum pluraj jaroj li estis estrarano de IKUE, kie li funkciis kiel vicprezidanto kaj la respondeculo pri la ekumena kunlaboro precipe kun la Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI).

Ĉe la fondkunsido de la junulara IKUEJ-sekcio en la jaro 1996 okazinta en la Katolika E-Tendaro en Sebranice, Ĉeĥio, li estis elektita kiel animzorganto.


Li ankaŭ estis membro de la Liturgia Komisiono de IKUE, fondita laŭ la invito de la Kongregacio pri la Sakramentoj kaj Dia Kulto por revizii la liturgiajn mestekstojn en Esperanto.





*En la 59-a IKUE-kongreso 2006 en Velehrad*

Li partoprenis plurajn IKUE- kaj ekumenajn E-kongresojn. Kiel lastan li partoprenis en la jaro 2012 la 65-an kongreson de IKUE en Pécs, Hungario. Ankaŭ li partoprenis Universalajn E-Kongresojn kaj plurajn E-aranĝojn, dum kiuj li celebris esperantlingvajn sanktajn mesojn. Dek fojojn li partoprenis la Katolikan E-Tendaron en Sebranice, Ĉeĥio (inter la jaroj 1993-2004), kie li plenumis animzorgan servon, precipe ĉiutagajn E-mescelebrojn.



*Tute kontenta pastro Lajos en la Katolika E-tendaro 2004 en Sebranice, Ĉeĥio*

**Ripozon eternan donu al la pastro Lajos, Sinjoro, kaj la senfina lumo lumu al li, li ripozu en paco. Amen.**